



OOMOTO

INTERNACIA

Monata organo de la UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Telefono : PASSY 45-87
KLEBER 08-00

Sidejo : 124, rue de la Pompe, PARIS (16°)

Telegrafa adreso :
EUROPOMOTO-PARIS

Poŝtekonto : Paris, N° 448.77

Forĵetu, se necesas,
la korpon, sed neniam
la animon, kiu ja estas
substanco de homo.
Nur dank' al animo,
homo tenas vivon.

ONISABRO DEGUĈI.

Jarabono por ĉiuj landoj : 3 sv. fr.
Abonantoj dezirantaj membrokarton ricevas tian senpage.

Ĉefredaktoro : K. NIŠIMURA

Helpredaktoro : H. OTAKA
Generala Sekretario : V. M. ŠIŠKOV

☆ Poŝtmandatoj devas esti sendataj al la persona nomo de la ĉefredaktoro. ☆

Kiam venos la paco ?

Oni povas esti kiel ajn optimista kaj tamen, konstati, ke la nuna mondo donas mizeran aspekton. Ĉie suprajaj, kruelaj, vantaj homoj, avidaj je gloro kaj mono ! Malkonfido, trompemo, jaluzo regas ĉe riĉuloj kaj malriĉuloj, ĉe altrunguloj kaj simplaj homoj. Kaj la neevitbla sekvo de ĉi tio : interna mizero, malriĉeco kaj milito !

Ofte oni demandas sin, kial ? La vivo povus esti tiel simpla, tiel ĝojplena, se oni sciis kiamaniere vivi ĝin !

Sed tio ĝuste estas la problemo : kie trovi la vojon al paco, feliĉa vivo ? Ni devas kompreni, ke la paco kaj la feliĉo ne povas esti *celo*, sed devas esti *sekvo* de propra animstato.

Vane la homoj kredis, ke la Ligo de Nacioj alportos la sopiratan pacon. Dek jarojn ĝi laboris kaj de ĉiuj flankoj oni armas sin kaj minacas milito. La kaŭzo ?

Ĉar la Ligo de Nacioj ne radikikiĝas en la koroj de la popoloj. Ni bezonas alian Ligon de Popoloj, bazitan sur la bona volo de la homoj mem, sur la arda deziro de ĉiuj individuoj respekti unu la alian, ne konsiderante nacion, rason aŭ religion.

Tiam pacproblemo ne plu ekzistus.

Kiamaniere tio povas iam realiĝi ? Malfacila estos la vojo, ĉar radikala reformigo de la individuo kaj de la vivmaniero estas necesa.

Jen la tasko kaj celo de ĉiuj religioj, montri tiun vojon al vera feliĉo, instrui la erarantajn homojn kaj voki al ili firme kaj forte : Tiel vi ne povas daŭrigi — haltu kaj enpensiĝu !

Ĉu la homoj aŭskultos ? Ili ja devos, ĉar jam ili vidis, ke la feliĉo ne estis tie, kie ili serĉis ĝin, ke la paco ne venis per traktatoj kaj politiko.

Ni enpensiĝu kaj esploru nin mem. Ni konstatu niajn erarojn, niajn infanajn dezirojn al ĉiu, kio brilas. Ni vivu simple, ne turmentante bestojn por nutro kaj modo, ne sopirante al multaj havaĵoj, kiuj estos nur ŝarĝo, ni estu kontentaj, ni havas la devon akiri ekvilibron kaj feliĉon, por ke ni povu doni konsolon al malfortuloj, helpoj al malfeliĉuloj.

Kaj tiam ankaŭ ni trovos la internan pacon, kiu estas la nura kondiĉo de la feliĉo kaj la sola bazo por inda, homa mondo.

J. R. G. ISBRÜCKER.

GRAVA AVIZO

Per tiu ĉi numero ni komencas ĉesi la sendadon de « Oomoto Internacia » al tiuj el niaj legantoj, kiuj ĝis nun ne sendis al ni sian abonkotizon. Tion ni faros laŭgrade kun la apero de ĉiu nova numero de « O. I. »

Ni do urĝe vin petas, ke vi tuj sendu al ni vian abonkotizon. Kontraŭokaze, vi riskas ne ricevi nian ĵurnalon.

Fariĝinte nia abonanto, vi ricevos : 42 numerojn de « Oomoto Internacia », 40 belajn Oomoto-ilustritajn poŝtkartojn (japanajn pejzaĝojn) kaj senpagan U. H. A.-membrokarton.

Ĉi ĉio por 3 sv. fr. aŭ 45 fr. fr.

Abonu senprokraste ĉe S-ro K. NIŠIMURA, 124, rue de la Pompe, Paris, 16°.



Enirejo de Kolenkaku, loĝejo de Majstro O. Deguĉi.

Ĉu vi volas fari bonan agon ? Jes !
Sendu al ni vian brikon por la konstruo
de la DOMO DE HOMAMO.

Al ĉiu donacinto de 100 fr. fr. por la
DOMO DE HOMAMO ni senpage donas la
belan libron « Sinjoro Laŭdata ».

SONĜO DE SONĜO

(3)

HIDEMARU DEGUĈI

Tamen, iom poste iu granda amiko venas al ili por forpeli la baraktigajn viziojn ; tio estas ja la forto, kiu estis provizita en ilia animo, kiam ili pensis kaj intencis la belajn aferojn kaj noblajn agojn en la vivo sur la tero...

Disvolvante tiamaniere diversajn pensojn en la koro, fine mi elkonstruis la tri turojn. Mi min klinis profunde antaŭ ili kun la manoj plektitaj je brusto kaj komencis reciti la preĝvortojn de Amacu-Norito (1). Estis strange, ke mi ne povis sukcese finreciti tiujn nelongajn vortojn per unu fojo, senerare. Multfoje mi falis en la recitado. Mi decidis, ke mi ripetu ĉe milionon da fojoj, ĝis kiam mi sukcesos kaj, ke mia tuta laboro en la nuna momento ja estas tio ĉi, senerare diri la preĝvortojn. Kun tiu serioza kaj streĉita koro mi fermis la okulojn kaj ordigis miajn spirojn. Baldaŭ poste mi malfermis la okulojn, fiksis mian rigardon je certa punkto de la meza templo kaj eldiris la vortojn tre nature kaj trankvile. Apenaŭ mi diris la komencajn kelkajn vortojn, kiam subite unu ŝtoneto siblante alflugis al mi de malantaŭe kaj ĝi falis sur la teron, distance de mi kelkfutojn. Momente mi ektimis, tamen mi reakiris kuraĝon, kvietigante la animon. Sekvis ankoraŭ da ŝtonetoj du, tri, kvin, pluraj, kaj fine ili falis kiel pluvo. Dume mi daŭrigadis mialflanke la recitadon, tute lasante min al la evoluo de la okazantaĵo. Strange, neniu ŝtono trafis min, sed ĉiuj falis surteren kun distanco de kelkaj futoj, tial ili neniom min vundis. Kiam mi estis finonta la preĝvortojn, la nombro de alflugantaj ŝtonoj jam rimarkinde malgrandiĝis, sed ankoraŭ ili alflugadis ĝis la fino. Ĉiu venis de malantaŭ mi. Sukcesinte nun je senerara recitado, mi levis min de la lasta klino, tiam, mi sentis mian frunton brule varmega. La tuta korpo sentigis ankaŭ varma kaj ial malpeza, kvazaŭ sidanta en la aero. Mi ekrigardis en la ĉielo, kaj trovis tie amason da ruĝaj fadenoj kiuj kuras, sin krucante super la tri turoj. En la sekvanta momento mi vidis antaŭ mi unu punkton da lumo, kiu pli kaj pli ŝveligis en granda rondo kaj fine sin transformis je belega infaneto, kiu ekstaris antaŭ la turoj. La bela ĉielulido enrigardis min al la vizaĝo, ekridetis ĉarman ridon kaj formalaperis subite en la spaco.

Mi min retiris de la sonĝa emocio. Ĉiu
(1) Amacu-Norito = Ĉielaj benvortoj, hereditaj en Japanujo de la plej antikva epoko.

lumo malekzistis nun, estis malvarme ankau, kaj mi estis treege lacigita. Al mi forte jukis la korpo kaj mi ekgratis kaj gratadis de sur la ĉemizo. La supraĵo de la ĉemizo, kiu algluigis al mia haŭto, defalis en pecoj kiel elbrulita cindro.

III

La ĉemizo ankoraŭ nun estis algluita al mia korpo. Nur ĝi iom maldikiĝis pro la skrapado. Nun mi komencis profunde domagi pri mi mem; eĉ, mi sentis tedon je mi. Multe mi afliktis, pensante:

„Pro kia peko mi estas devigata portadi tiel malagrablan ĉemizon, kiu aspektas kiel malbela skvamaro! Ĉu ne estas ia rimedo tute demeti for de mi tiun abomenan ĉemizon?“

En tiu ĉi momento mi estis subite kaptita de iu songeca sento.

Estis sur alteta monteto; kaj mi estis surprinranta unu mizeran ŝtonŝtuparon duone ruinigitan. Ĉirkaŭe regis ĝenerale griza koloro de laceco; tamen, sufiĉe da arboj kovritaj per riĉaj folioj estis videblaj. Supre ĉe la fino de la ŝtuparo staris malnova kaj malgranda domo eto el ligno. Mi eniris en ĝin. Kiel supremiga kaj malgaja atmosfero! Kia persono povus loĝi en tia domo? En ĝia mezo estis malgranda korto de la enirejo ĝis la malantaŭo de la domo kaj ambaŭflanke de la korto estis nur du malgrandaj ĉambretoj. La interno de la domo estis ĝis bone balaita; neniu polvo estis trovbla, pro kio mi konkludis, ke iu enloĝanto devas esti, kvankam neniu estas tie en nuna momento. Iu timiga aero minacas min, kaj tial, mi ekvolis returneniri. Tiam maljuna virino proksimume sepdekjara, kun afabla aspekto, revenis en la domon tra la malantaŭa pordo. Interfrotante siajn manojn, ŝi diris al mi tre ĝentile, nur:

„Pardonu, Sinjoro..., Pardonu, mi petas, Sinjoro.“

(Dairigota.)

AKVA SPEGULO

ONISABRO DEGUĈI

Kvar suferoj de homo

Naskiĝo, malsano, kadukiĝo, morto, ĉi tio estas nomata la kvar suferoj de la homo vivo, kiuj estas la suferoj plejgradaj inter aliaj. El la kvar, la sufero de naskiĝo estas la plej granda (pli granda ol tiu de akuŝantino). Pro tiu ĉi sufero la homo tute forgesas pri ĉio de sia antaŭa vivo kaj fariĝas perfekte ignora pri ĝi. Sekvas la sufero de malsano. Tion ĉi oni spertas tre konscie plimalpligrade. La tria estas tiu de maljunigo, kadukiĝo, kaj lastvice — pli kaj pli malgrandiĝite en la grado, — jen la morto, kiu estas la plej malgranda sufero el la kvar.

Pino, Tero, Akvo

Plejparto el malsanoj estas kuracebla per pino, tero kaj akvo. Dekoktaĵo de pin-folioj (precipe, folioj de tielnomata virinpino, maldikaj, molaj kaj sufiĉe longaj) estas tre efika por forigi febron. Tero estas kontraŭ ĉiuj vundoj: tranĉitaj, bruligitaj, kunbatitaj, k. a., kaj estas bone ankau por abscesoj. Akvo estas vere resanigilo kontraŭ ĉiuj malsanoj; neniu medikamento ĝin superas, oni povus diri. Donu akvon al bebra malsanulo tiom, kiom li postulas. Tre bone! Sed preferu la naturan putakvon ol kanalakvon, ĉar la unua havas plenan vivecon kaj vigecon, kiel akvo, dum al la lasta tiu mankas. Mi iam antaŭe resanigis malsanulon de granda febro nur per akvo spite de severa malpermeso de kuracisto, kiu eraras. Akvo estas admirinda resanigilo.

Floroj

Sufiĉas unu floro por ĝin montri al tiu, kiu diras, ke li ne komprenas Dion; kaj lin demandi: „Ĉu vi ankoraŭ ne komprenemas Dion per tio?“

Bataloj en Dia Mondo

(12) (de Majstro O. DEGUĈI)

ĈAPITRO XXXIV

de la *Rakontoj el la Spirita Mondo*

Batalo sur la monto Ŝinai

Post kiam la partio de *Takekuma* malsukcesis en la kamparo de Edeno, la malicaj soldatoj apenaŭ povis savi sian vivon nur dank' al rapida forkuo de la batalkampo. Ili nun rifugiĝis en la montogorĝo nomata *Dojama*. Kaj tie kolektiĝis la forkurintaj soldatoj, venantaj el ĉiuj partoj de la montaro. Ili denove preparis sin, havante la intencion ataki la monton *Ŝinai*. Ili petis *Otorahiko*'n, kiu ja estas kuraĝa generalo de unu el la malicaj armeoj, ke li bonvolu helpi ilin en la batalo kontraŭ la Dia Mondo. Kaj ĉar *Otorahiko* havis la saman intencion, li tute nature akceptis tiun ĉi inviton. Do, li facile kolektis kelkdek milojn da mongolaj diabloj kaj organizis sian armeon de malicaj dioj je la piedo de la monto *Dojama*.

En tiu ĉi fazo de la historio *Ojasima-Hiko-no-Mikoto* jam ree regis en la Drakpalaco, aranĝante la diversajn aferojn de la Regno. Ekscianta pri la preparigo de la malamalikaj fortoj por la atakado de la monto *Ŝinai*, li tuj deziris forigi ilin de tie, ĉar la diino *Izu-no-Mitama* estis tie sur la monto; li estis preta ekiri kun malmultnombra dia armeo.

Kin-Kacu-Kane-no-Kami antaŭvidante la malican planon de la partio de *Takekuma*, petis ĉesigon de la militiro. Efektive, multe da spioninoj troviĝis jam tiutempe en la Drak-

palaco kaj esperante la baldaŭan foriron de *Ojasima-Hiko*, ili preparis la ukupon de la Drakpalaco.

Inukohime estis sin kaŝinta ĉe la piedo de la monto de l'Olivarboj. Ŝi komandis sufiĉe fortan malican armeon kaj okaze intencis helpi al *Kocunehime*. Ili volis ataki la Drakpalaco samtempe de ekstere kaj de interne kaj tiamaniere la danĝero estis tuj.

Dume en la interno de la Palaco la diaj soldatoj estis tre malmultnombraj. La plejmulto el ili estas foririnta al la monto *Ŝinai*. *Ojasima-Hiko* do akceptis la proponon de *Kin-Kacu-Kane-no-Kami*, ne plu insistis pri helpo donata al *Izu-no-Mitama*, sed restis en la Drakpalaco, por ĝin gardi kontraŭ la malamlikoj. Tamen, granda estis lia maltrankvileco pri la sorto de *Izu-no-Mitama*, kiu troviĝis sur la monto *Ŝinai*. Ni ja povas imagi la dileman situation de *Ojasima-Hiko*: unuflanke li tremis pro la vivo de *Izu-no-Mitama* kaj deziregis alporti helpon al la monto *Ŝinai*; aliflanke li timis, ke okaze de foriro, la Drakpalaco estus okupata de la malamalikaj fortoj.

Takekuma helpata de *Otorahiko* vere atakis la monton *Ŝinai*. Kelkdek miloj da mongolaj soldatoj atakis la monton samtempe de ĉiuj flankoj. *Takekuma* ordonis al *Kocunehime* kaj *Aŝinaga-Hiko*, ke ili rekte ataku la deklivojn de la monto, uzante la helpo de grandnombraj malicaj drakoj, kiuj kunvenis de proksimaj kaj malproksimaj regionoj de la mondo. Tiuj ĉi drakoj havis la povon okazigi nubon kaj pluvon laŭplaĉe. Dume la mongolaj soldatoj ĉirkaŭis la monton, formante 10-kaj aliloke 20-oblanj atakliniojn, tiamaniere, ke la *Ŝinai* Monto estis ligita per veraj ŝnuregoj da malamalikaj soldatoj.

Izu-no-Mitama vidis ĉion ĉi de la supra de la monto kaj ŝi juĝis la situation danĝera.

Kiu kreas tiun floron de belaj koloro kaj odoro? Kiu fabrikas la flaron en tiom granda diverseco laŭ koloro, formo kaj odoro, el la sama tero nur pro la diferenco de semoj?

Kiu havas kapablon tion fari? Ĉu ne, floriŝtoj nur donas al ili zorgon? sed nenion alian ili faras...

Nu, se li, la skeptikulo, ne ankoraŭ ekkomprenas Dion, li estus finfine homo de malbonega cerbo.

Granda Laboro

Por mi ne ekzistas granda laboro. Mi konsideras kian ajn grandan laboron simple ordinara. Kaj mi iniciatas tion vere en tiu konvinko. Oni facile parolas jene, ekzemple: „Mi entreprenas nuntempe grandan laboron“, ktp. Traktante la aferon granda jam antaŭ ol ĝin komenci, oni neniel tion sukcesus, ĉar tiam la homo estas premata, aŭ pli ĝuste, engluata de la laboro mem.

Sukceso de laboro estas certa, nur kiam oni agas super ĝi kun forta maltimego konsideri ĝin nur eta afero, eĉ tian laboron, kiu ŝajnas vere granda de observantoj.

Bulgara Esperantista Asocio

RUSE, str. Bojanci 5, Bulgarujo

petas ĉiujn redaktejojn de la esperanta ĵurnalaro, la Esperanto-asociojn kaj ĉiujn esperantistojn sendi al la supra adreso esperantajjn, librojn, gazetojn, fotojn de eminentaj esperantistoj, gvidlibrojn, prospektojn, afiŝojn en kaj pri Esperanto.

La ricevita materialo helpos ĝian iniciaton aranĝi tutlandan Esperanto-ekspozicion, kiu certe instigos grandan intereson ĉe la bulgara publiko pri Esperanto. Antaŭdankante vin, ni salutas vin estimplene.

B. E. A.

Sekretario: Kapitano St. RADEV.

ATENTON! Oni povas jam aboni aŭ reaboni nian ĵurnalon « Oomoto Internacia » ankau per nia postĉekkonto: NIŜIMURA KOOGECU, PARIS, N° 448.77.

Ŝi nomis *Takasugi-Uake* kiel ĉefkomandanton kaj elektis la sekvantajn subgeneralojn: *Curuŭaka*, *Kameŭaka*, *Takatori*, *Karihime* kaj *Inateruhiko*. Ili pretiĝis por gardi la posedon de la monto spite al la malamlika armeo. Tamen, la diferenco de la malamlika kaj la Dia armeoj estis grandega. La falo de la Monto ŝajnis esti eĉ tre baldaŭa kaj la persono de *Izu-no-Mitama* troviĝis en danĝero, kiu fariĝis pli kaj pli granda ĉiunminute.

Ankaŭ, granda nombro da malicaj soldatoj, subuloj de *Daiji Zaiten*, flugante en la aero, faligis fajrobombojn sur la monton de *Ŝinai*, suferigante la malgrandan sed heroan armeon de *Izu-no-Mitama*. *Izu-no-Mitama* sendis do *Takatori* kaj *Karihime* al la Drakpalaco, raportante pri la danĝera situacio de la monto *Ŝinai*. Ŝi ordonis al *Kin-Kacu-Kane-no-Kami* sendi helpan armeon al la monto. *Ojasima-Hiko-no-Mikoto* estis do tute konfuzita. Post longa pripensado li transdonis al la delegitoj la perlon de *Masumi*. Ili forflugis en la ĉielo, super la malica armeo, atingis la monton *Ŝinai*, alteriĝis sur la montopinto kaj transdonis al la alvaloran perlon al *Izu-no-Mitama*. La diino goje ricevis la perlon. Ŝi alproksimigis ĝin al sia buŝo kaj forte blovis sur ĝin en la direkto de la malicaj soldatoj. Kiam ŝi blovis al la Oriento, la orienta armeo disfalis; kiam ŝi blovis al la Okcidento, la okcidenta armeo disfalis siavice. Kaj tiamaniere, la malicaj soldatoj re diskuris en diversajn direktojn. La dia povo de la perlo forkurigis malamlikojn aŭ inter nubojn, aŭ en nebulojn, kaj la tuta malica armeo malaperis.

La ĉielo ĝisnun malluma, subite lumigis kaj la diaj soldatoj de la monto *Ŝinai* ankau revenis al nova, vigla vivo. En regula vico ili revenis en bona ordo al la Drakpalaco.

El la Paroladoj de P. Danov
gvidanto de Blanka Frataro

Ne estas eble neniigi justan homon. La judoj kruccigis Kriston, sed ĝis nun ili elprovas la konsekvencojn de tiu ĉi ago. La japanoj persekutis la gvidanton de Oomoto — Onisabro Degučĉi, kiun Dio sendis, sed grandaj malfeliĉoj trafis ilin. Tuta Japanujo dismoviĝis pro teruraj tertremoj... Ĉiu popolo, kiu provis kontraŭstari la Diajn ambasadorojn, ne spertis bonon... Ĉiu, kiu sin deklaras kontraŭ la Diaj senditoj, sin deklaras kontraŭ Dio.

El Frateco.

pagataĵon. Kaj ĉar oni elspezas monon por io, pro tio ĝi estas utila.

Ĉiu havas la moralan devon subteni nian por-homaran entreprenon, ni pensas. Se via briko, laŭ vi, estus tro malgranda (laŭ ni, ĝi estos ĉiam granda), klarigu la tutan aferon pri la « Domo » al riĉulo kaj instigu lin helpi nin.

Ni, la esperantistaro, donu provon de certa agemo, kiu estu, antaŭ ĉio, produktiga-fruktodona.

Kompreneble, ni ne uzas tiujn severajn terminojn por admoni vin, ĉar eble vi laboras pli lerte ol ni kaj ni estus tre dankemaj al vi, se ni vidus vian nomon en « O. I. » inter la donacintoj.

LA REDAKTEJO.

(6)

Domo de Homamo

La Domo de Homamo ricevis de :

S-ro Bruklis Kristis, Alsvanga, Litov.	fr. fr.	7.—
S-ro S. Suzuki, Paris, Francujo	fr. fr.	10.—
S-ro G. Jazaŭa, Paris, Francujo	fr. fr.	10.—
S-ro Kamejama, Paris, Francujo	fr. fr.	5.—
S-ro Kitazato, Paris, Francujo	fr. fr.	5.—
Tensejŝa, Kameoka, Japanujo	fr. fr.	250.—
S-ro Matěj Louda, Praha, Ĉeĥo-slovakujo	fr. fr.	6.—
S-ro M. Dédéček, Železny Brod, Ĉeĥo-slovakujo	fr. fr.	13.—
S-ro G. Mestre, Paris, Francujo	fr. fr.	2.—
S-ro J. Marchand, Paris, Francujo	fr. fr.	2.—
S-ro E. Royer, Paris, Francujo	fr. fr.	2.—
S-ro A. Linder, Paris, Francujo	fr. fr.	5.—
S-ro Dubois kaj edzino, Paris, Franc.	fr. fr.	5.—
F-ino Sofia Cipera, Linz a/D., Aŭstr.	fr. fr.	10.—
S-ro Victor Polgar, Paris, Francujo (por la tria fojo)	fr. fr.	100.—
S-ro P. Humberset, Le Locle, Svisujo	fr. fr.	25.—
Kvina listo	fr. fr.	4.591.—

Entute fr. fr. 5.048.—

Kore dankas

Oomoto Internacia.

Kian ajn sumon ni akceptas kun plej granda danko. Bonvolu sendi vian brikon al S-ro Niŝimura, 124, rue de la Pompe, Paris-16^e.

La nomojn de la donacintoj ni publikigos en Oomoto Internacia.

PARIZA BANKO

gardos la monon por la Domo de Homamo

Kiel niaj legantoj povas rimarki en la nuna numero, la kolektita sumo por la Domo de Homamo surpasas 5.000 frankojn. Tio estas dank' al la simpatia komprenemo kaj malavareco de kelkaj gesamideanoj, kiuj, laŭ sia ebleco, kontribuis al la verko, de ni entreprenita, pro kio ni esprimas al ili nian sinceran dankon. Ĉu estus necese diri, ke ili kredis en la realiĝo de « la Domo »? Tute ne! Ĉar ili kredis, ke la realiĝo estas certa, kvankam ne tiel baldaŭ; ili konfidis al ni siajn brikojn; fine, ili kredis, ke ili ne restos solaj kontribuintoj, ĉar aliaj gesamideanoj ilin sekvos. En komuna agaro ni ĉiuj atingos nian celon. Kaj la pli frua subteno al la iniciato plirapidigos la atingon de la celo.

Por ne lasi la kolektitan monon senprodukta, ni elektos iun bankon, kiel deponejon de ĉiuj sumoj, kiujn ni ricevas por la Domo de Homamo. La deponitaj sumoj kapitaliĝos kun iom da intereso pojare, tute estante en certa loko, de kie neniu tuŝos ilin, ĝis ni kolektos la necesan sumon.

Ni opinias superflue aldoni, ke ni havas fortan konvinkon kaj nepran deziron realigi la komencitan entreprenon. Nenio nin malkuraĝigos. Neesperantistoj kaj esperantistoj plendas (kial? ili mem ne scias!), ke Esperanto ne havas praktikan utilecon. Kaj la praktika utileco signifas, en la nuna tempo, la monon, kiun oni utiligas por praktikigi la pro-



Sinjorino J. R. G. ISBRÜCKER (legu ŝian artikolon sur la unua paĝo.)

FILMARTO

Tempesto en Azio — de Pudovkin, ekspluatas temon tre originalan, ĉerpitan el la vivo de la grand-nombra mongola gento, ekloĝinta en Siberio de tre, tre fruaj tempoj. La legendo, pri la ekzilo de la japana princo Ĉingiz Han en Siberion, servis kiel bazo al la aŭtoro, kiu majstre ĝin uzis, por formi multsignifan epizodon, kiun pli malsupre ni koncize rakontos. La paca vivo de la mongoloj, trompataj kaj forrabataj senmezure; ilia ribelo kontraŭ la blankuloj-subpremantoj; la rivelo de la rekta posteulo de Ĉingiz Han, kiu (posteulo) fariĝinte ĉefo de sia gento, forpelas en furioza batalo siajn subpremantojn, ĉi ĉio disvolvatas ĉenon da scenoj, pro kiuj la okulo ne restas saturita de superfluaĵoj kaj malverŝajnaĵoj, tiom ĉio estas arte kaj samtempe nature aranĝita.

Rusa filmo, ĝi honoras sian aŭtoron Pudovkin, unuaklasa scenmetisto, kies aludo pri eventuala mongola ribelo estas rimarkinda. La filmo, tamen, estus nenio, se Inkiŝinov, aktoro kun granda talento, ne kontribuis plej aktive kaj inteligente al ĝi, kie li montras sin respeguligo de la fama Ĉingiz Han.

Enhavo. — Neniu kredis kaj nenio ŝajnis kredigi, ke la juna kaj robusta Timur, kaptito de generalo Petrov, povus elmontri tiom da energio. Antaŭe, li ĉitutage, same kiel siaj samgantoj, ĉasis tra la vastaj kamparoj sovaĝajn bestojn, kies felojn oni vendis al komercistoj je tre malaltaj prezoj, kio apenaŭ povis nutri la familion dum la tuta jaro. Kaj nun la vigla kaj forta filo de la siberiaj ebenaĵoj kondukis kiel senpova maljunulo, kvazaŭ sur lin pezus 80 jaroj. Estas vere, cetere, ke li havis apenaŭ resaniĝintan vundon, kiun li ricevis, kiam laŭ ordono de la generalo, li devis esti mortigota.

Kaj nun, estante kaptito, li havis nenian kulpon. Fakte, oni lin kulpigas je ribelo kaj tial, oni provis lin mortigi, sed Timur, tiu brava kaj paca mongolo, ribelis pro grava kaŭzo. Tiun jaron, inter la feloj, kiujn lia patro kolektis dum la ĉassezono, troviĝis felo de arĝenta valpo kies kosto devis sola sufiĉi al la bezonoj de la familio. Krom tio, la patro de Timur estis malsana kaj la familio bezonis multe da mono. Sed kio okazis? Timur iris al la unufojon okazanta dum la jaro bazaro kaj tie avida blankulo-komercisto simple forŝtelis de li la valoran felon, kio devigis la senesperigitan junulon forkuri al la montaro kaj ribeli kun la aliaj, kontraŭ la rabistoj.

Kaj ankaŭ neniu sciis la atklasan devenon de Timur — neniam signo parolis pri ĝi. Soldatoj trovis en liaj vestoj talismanon, kiu, laŭ la esploroj de kompetenta scienculo, pravas senkontesteble, ke Timur estas la rekta posteulo de Ĉingiz Han, tiu legenda princo, kiu en pratempoj estis teruro al ĉiuj ĉirkaŭaj gentoj. La nura prononco de tiu magia nomo provokas ĉe la mongoloj ardan entuziasmon de batalo al libero, kion la generalo Petrov bone konis kaj li kontente ridetis, kiam li eksciis, ke Timur estas jam preskaŭ resaniĝinta pro la vundo. Petrov povos lin kronigi imperiestro, dum li mem efektive regos kaj tiamaniere, li povos batali kontraŭ kiu ajn armeo, tute havigante al si grandajn profitojn. Cetere, liaj soldatoj sisteme forrabas la brutaron kaj la bienojn de la disiginta glora gento.

En la ĉambro, kie la kontrakto estos subskribata, kolektiĝis la ĉefoficiro de Petrov, li mem kaj Timur. Ili ja lojale ellaboros ĝin por doni egalajn rajtojn al ambaŭ gentoj: rusa kaj mongola; ili ja senpartie gardos la interesojn de siaj regatoj. Unuvorte, la estonto de la regno estos brila kaj promesodona. Tiuj favoraj kondiĉoj, ŝajne, absolute ne pasiĝis Timur'n, kiu fariĝis ankoraŭ pli flegma kaj senmova. Sed la pacaspektantan atmosferon rompis la fulma eniro de juna mongolo, kiun persekutis soldatoj. La generalo Petrov dum la starigo mem de la kontrakto ordonis al siaj soldatoj pafmortigi tiun mongolon; la kontrakto ja deklaras, ke la nova registaro « gardos » senpartie la interesojn de ambaŭ gentoj. La persekutito, simile al sendefenda birdo antaŭ sangavida aglo, sin kaŝis en angulo kaj ne plu moviĝis. La soldatoj vane penis lin dekroĉi de la angulo, kiam Timur per tigre salto liberigis sian samrasanon je la granda konsterno de la ĉeestantaro. Per ankoraŭ pli granda salto li dekroĉis sabron, renversis malpezegan tablon kaj la sabron en aero li perage pruvis, ke la sango de Ĉingiz Han ankoraŭ bolas en li. Furioze li atakis siajn morgaŭajn regontojn kaj detruinte la tutan domon, li forlasis sian moralan mortigejon.

Cie, kie li pasis, sagrapidaj rajdantoj lin sekvis. La horo de liberiĝo alvenis. La naturo mem aliĝis al ilia giganta ribelo, kontraŭ kiu ĉiu malamiko senreziste cedas... Ĉiuj elementoj dismoviĝas... Tempesto en Azio...

Pudovkin lasis al la granda tempo montri la finon de la ribelo, se ĝi iam okazus.

Rakontas

V. M. ŜIŜKOV.

La Unua Esperanto-Parolanta Filmo estas farita de « Paramount-Famous-Lasky-Corporation », Times Square, New York, U. S. A., kiu anoncas, ke en Usono ĝi havis plenan sukceson. Ĝi aperos en ĉiuj Eŭropaj landoj, en Aŭstralio, Japanujo, Brazilo ktp.

Estas grave, ke en ĉiuj landoj oni sciigu pri la datoj, kiam tiu ĉi filmo estos prezentata. Tion oni povas fari ĉe la loka Paramount-Oficejo aŭ kinematografajo.

Samideanoj, vizitu amase tiun unuan Esperanto-parolantan filmon kaj poste nepre skribu aprobleteron al la produktinto de la filmo *esperante* en New York, laŭ la supra adreso, ĉar en baldaŭa estonteco la Paramount-Filmkompanio intencas fari aliajn Esperanto-filmojn, kio ja dependas de la kvanto de la aprobleteroj.

Ni rimarkigu, ke la filmo estas farita en formo de parolantaj aktualajoj.

Oni laŭdas nian ĵurnalon

« La gazeto estas ĉiam bonvena, ĉar estas en ĝi io tre progresema, altideala kaj antaŭenrigardanta. »
 « Estas ĉi tie aliaj religiaj gazetoj, sed Oomoto estas kompare al ili gaja por la animo. Kaj la presado kaj la stilo estas tiom belegaj kaj nekutimaj, ke ĉiam mi ĝojas vivi ĉiun novan numeron ».

JOHN E. BAUMAN, Lincoln, Usono.

« Koran dankon pro sendo de « O. I. ».
 « Estas bonege, ke ekzistas Esperanto-ĵurnalo, kiu alten levigas la pensojn de la leganto kaj mi kore gratulas vin pro la enhavo de via ĵurnalo. »

F. A. GOODLIFFE, Horsham, Anglujo.

Ni bedaŭras, ke ni ne disponas multan lokon por publikigi aliajn leterojn, kiuj tre sincere esprimas laŭdojn rilate al « O. I. » Laŭokaze, ni publikigos tiajn, kiam lokon ni havos.

OOMOTO INTERNACIA.

BIBLIOGRAFIO

Belga Esperanto-Instituto sciigas al ni, ke la kosto de la *Belga Antologio* (du volumoj) : Franca kaj Flandra Partoj estas fr. belgaj 40.— (Belgoj) 8.— aŭ fr. sv. 6.— por ambaŭ volumoj kune. La du libroj ne estas vendataj aparte. Detalajn recenzojn ni donis por la du volumoj en numeroj 20-a kaj 38-a de *Oomoto Internacia*.
Estonta Eduko, de Ad. Ferrière, D-ro en sociologio. Eldono de U. E. A., Ĝenevo, 1, rue de la Tour de l'Île. 72 paĝa libreto, prezo ne montrita. Tradukita el « Transformons l'École » de H. Dannel. Lastajn jarojn la edukistoj rimarkis, ke la ĝisnunaj metodoj de eduko de la gejunularo ne plu taŭgas por la nova tempo kaj aperis movado por la transformo de la lernejo. Tiu ĉi libreto estas do alvoko al gepatroj kaj edukestraroj, kies deo estas, en komuna kunagado, adapti la lernejan edukon al la gejunularo de la nova epoko.

La Plej Profunda Fundamento de l'Homaranismo, de Janis Andersons, Pasta kaste 1021, Riga, Latvujo. 16 paĝa kopipresita broŝuro, prezo ne montrita (ĝis kiam la Esperanto-eldonistoj havos la kutimon ne montri la prezon de siaj eldonadoj!!! Granda parto el la esperantistaro subtenas la homaranismon, kio ja estas nia celo, celo de Universala Homama Asocio. La broŝuro pruvas al ni ankoraŭfoje, ke ĉiu akiritaj de la homa elpensemo devas servi por la bonfarto de la homaro.

Ruga Alŭoro, de M. Ljubin. Eldono de « Balkana Laboristo », ul. Sar Planina, 56, Sofia, Bulgariujo. 30 paĝa, prezo 10 levoj. Siamaniĝe, en la formo de versoj, la aŭtoro elmontras la « neceson » por la atingo de la « hela Estonto » en la kadro de la klasbatalo.

Ekonomia Revuo kaj Mastrumado, monata ilustrita revuo pri agrikultura mastrumado kaj socia vivo (bulgarlingva), redaktoro Al. Penĉev, V.-Tirnovo, Bulgariujo. Jarabono 50 levoj.

Inter la multaj artikoloj ni citu : La malriĉeco de la bul. agrikulturisto, Agrikult. ilaro kaj maŝinaro, Hejma apoteko ktp. Utilaj legaĵoj por la agrikulturisto, kiu multe helpas lin modernigi sian malfacilan laboron.

Frateco, numero 14-a, esperante kaj bulgarlingve, estas dediĉita al Oomoto-Movado. En ĝi, la redaktoro Sava Kalimenov, Sevlievo, Bulgariujo, publikigis la jenajn artikolojn : Oomoto kaj La Blanka Fratara, Mallonga Historio kaj Substanco de Oomoto-Movado, Rakontoj el la Spirita Mondo kaj El la Parolado de Majstro Danov pri Oomoto-Movado.

Le Cinéphile, semajna franclingva luksa revuo interesiĝas pri Esperanto. En ĝia 10 numero de 31-1-30 ni trovas esperante reproduktitan artikolon « Filmarto », kiu aperis en la 37-a numero de « O. I. » kaj ĉiusemajne ni trovas aliajn artikolojn rilate al Filmo kaj Esperanto. Gratulojn!

Redakto kaj Administrejo : 5, rue Saulnier, Paris 9^e. Jarabono : Por Francujo 70 fr. fr. simpla eldono, 100 fr. fr. ĝenerala eldono ; por poŝtunuigataj landoj : 100 kaj 140 fr. fr. ; por aliaj landoj : 150 kaj 200 fr. fr.

La Tribune Espérantiste, numero 1, trimonata propagandorgano de la francaj esperantistoj (franclingva). Administrejo : 4, rue Stimmer, Strasbourg, Francujo. Jarabono 10 fr. fr. Tiun ĉi gazeton, kiu eble anstataŭos

La Reĵnan Stelon, redaktas lertaj orientfrancaj samideanoj, kiuj sukcesis prezenti al la neesperantista publiko taŭgan konvinkilon.

Oomoto, la monata organo de nia movado, numero 53, aperanta en Kameoka, Japanujo, oferas al la legantoj interesajn artikolojn : Religia ideo kaj Sociala ideo, Ĉefinstruo de Oomoto, Apoteozita « Anstataŭ-Mano » Vera Homoj aperas en insulo de maro, La 47-a volumo de « Rakontoj el la Spirita Mondo », Respondoj al niaj demandoj ktp, ktp. Petu senpagan specimenon!

Verda Mondo, organo de Esperanto-Propaganda Oficejo, Kameoka, Japanujo, de post januaro 1930 aperas en nova vesto, tre arte desegnita. La revuo estas nun pligrandformata kaj ĝi daŭras sian vojaĝon tra la mondo. En la januara numero la redaktoje konigas al siaj legantoj la ĉefurbon de Ĉeĥoslovakujo Praha.

Aŭstria Esperantisto, Arbeiter-Esperantist, Balkana Laboristo, Belga Esperantisto, Bulgara Esperantisto, Esperanto (Ĝenevo), Esperanto-Praktiko, Espero Katolika, Flandra Esperantisto, Germana Esperantisto, Heroldo de Esperanto, Hispana Esperanto, Ilima Telegrafisto, Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio, Junulara Ligo de Nagasaki, La Juna Balatalano, La Movado, La Progreso, La Revuo Orienta, La Suda Kruco, La Vojo de Klerigo, Marto, Ondo de Danĝava, Pola Esperantisto, Sennaciulo, Skolla Heroldo, Svenska Esperanto-Tidningen, The International Language, The British Esperantist.

L'Amitié Française, La Revue Spirite, L'Ere Spirituelle, Fraternité, L'Aube Nouvelle, Vers l'Unité, Das Wort, Der Freidenker, Vegetarische Presse, The Rosicrucian Magazine, Unity, New Thought, Odeaya, La Luĝ del Porveniri, Naj-Novo Vreme, Novo Vreme.

Villeemska Zvezda, la semajna bulgarlingva revuo reproduktas preskaŭ en ĉiu sia numero artikolojn el « O. I. ». Ni tre dankas.

LETERKESTO

Ni ricevis la abonkotizojn de la jenaj Samideanoj : S-roj Bruklis Kristis, Alsŭava, Litovujo ; Karel Straka, Praha, Ĉeĥosl. ; J. Novotny, Praha, Ĉeĥosl. ; Emil Kreibich, Kladno, Ĉeĥosl. ; Josef Jansson, Mora Noret, Svedujo ; J. X. M. de Couto, Liverpool, Anglujo ; P. H. Koomen, Ymuiden, Holando ; F. A. Goodliffe, Horsham, Anglujo ; Matěj Louda, Praha, Ĉeĥosl. ; M. Dědeček, Zelený Brod, Ĉeĥosl. ; Adolfs Nagezeius, Vilnava, Litovujo ; Václav Strihavka, Kladno, Ĉeĥosl. ; F-ino Felicia Acosta, Pando, Krugvajoj ; José S. Molina, Jatava, Hispanujo ; Ch. S. Davison, Winnipeg, Kanado.

Al ĉiuj — koran dankon!

Ni denove petas niajn legantojn sendi al ni senprokraste sian abonkotizon. Kiel ni diris sur la unua paĝo, de nun ni komencos ĉesi la sendadon de *Oomoto Internacia* al tiuj samideanoj, kiuj ĝis nun ne bonvolis sendi sian abonkotizon por subteni nian ĵurnalon.

Oomoto Internacia bezonas monon por daŭrigi sian vivon. Donu al ĝi eblecon vivi! Alie vi riskas ĝin ne ricevi.

Ni petas ankaŭ niajn ĝisnunajn abonintojn *renovigi* sian abonkotizon, ĉar kontraŭokaze, ni estos devigataj ĉesi ankaŭ al ili la sendadon de nia ĵurnalo.

Aliflanke, ĉiu estas petata sendi sian brikon por la *Domo de Homano!* Kiom ajn malgranda estu la sumo, ĉiu ni ricevas por tiu grandioza entrepreno — la *Domo de Homano* — ni estos dankemaj al la donacintoj. Nek unu centimo perdis el la donacitaĵoj. Se ĉventuale la entrepreno ne realigis, *kion ni absolute neniel deziros*, ĉiu havus rajton repropriigi al si la sumon pere de ni.

Abonu nian ĵurnalon *Oomoto Internacia!* Demandu, abonante ĝin, senpagan membrokarton de U. H. A. ! Kompreneble, ĉiu aboninto ricevos premion de 10 ilustr. Oomoto-poŝtkartoj (japanaj pejzaĝoj).

Subvenu la realigon de la *Domo de Homano!* Farinte tion, ne nur ni, sed la tuta homara posteularo vin dankos.

Abonu! Subvenu! Agu!

KORESPONDO

S-ro Friedr. Hahn, Weizenkampstr. 99, Bremen 4, Germanujo, deziras korespondi Esperante, angle kaj germane.

NIA LITERATURO

Ni atentigas niajn legantojn pri nia literaturo, havebla en nia oficejo :

Prezo: Sv. Fr.

- Kio estas Oomoto?** eldono de Oomoto-Oficejo, Kameoka 0.60
 - Konturo de Oomoto**, sama eldonoje 0.20
 - Origino de Oomoto**, — **Sankta Vivo de S-ino Nao Deganŭi**, eldono de UHA-Oficejo, Paris 0.25
 - Klarigo de Kamigakari**, sama eldonoje 0.40
 - Fundamento de Animo**, — 0.30
 - What is Oomoto?** (anglalingva), sama eldono 0.40
 - Oomoto** (germanlingva), eldono de Neugeist, en Pfullingen, Germanujo 0.50
 - Oomoto**, monata organo de Oomoto-Propaganda Oficejo, Kameoka, Jarabono 4.80
 - Sinjoro Laŭdata**, eldono de Oomoto-Oficejo, Kameoka 1.50
 - Das Reich Gottes auf der Erde**, eldono Rud. Burkert, Niemes, Ĉeĥoslovakujo 0.75
 - Verda Mondo**, monata organo de Esperanto-Propaganda Asocio, Kameoka, Jarabono 3.—
 - Oomoto Internacia**, monata organo de Universala Homama Asocio, Paris, Jarabono 3.—
- Rimarko* : Ni akceptas abonkotizojn por nia ĵurnalo « Oomoto Internacia » ĉiutempe dum la jaro.

Mono, poŝtmandatoj aŭ rekomenditaj leteroj devas esti sendataj al la persona nomo de la ĉefredaktoro, S-ro Koogecu Niŝimura, 124, rue de la Pompe, Paris (16^e).

Das Reich Gottes auf der Erde

Mallonga germanlingva historio de Oomoto. Bona propagandilo poresperanta.

4 bildoj — 32-paĝa Prezo : 4 k. ĉ. aŭ 60 pf. (eksterlando).

Havebla ĉe : Johannes-Baum-Verlag (Weisse Fahne) in Pfullingen, Württemberg. J. Kahler, Glockenverlag, in Freiheit i. Riesengebirge Teĥoslovakie. Buchhandlung Andreas Pichl, in Wien, linke Wollzeile 8. Rudolf Burkert, in Niemes, Böhmen.

OOMOTO

MONATA ORGANO DE OOMOTO-MOVADO
 Prata gazeto esperanta de « Oomoto Internacia »

Ni rekomendas ĝin al ĉiuj, kiuj pli bone volas koni la Oomoto-Movadon.
 Petu senpagan specimenon!

Eldonejo de « Oomoto » :
**OOMOTO-PROPAGANDA OFICEJO
 KAMEOKA, KIOTO-FU, JAPANUJO**

Jarabono : 4,80 sv. fr. 40-paĝa broŝuro 24 x 16 cm.

VI MIRAS

pro la kresko de la Esperanto-Literaturo !
 Vi miras kaj ne scias kian libron aĉeti ?
 Ni donos al vi konsilon :

AĈETU

la plej originalan Esperanto-libron, luksan eldonon kun japana teksto, 110-paĝan kun interesaj poemoj kaj dediĉitaĵoj al S^{ro} O. Deganŭi — temas pri la mirindaĵo —

SINJORO LAŬDATA

Prezo : nur 1,50 sv. fr.
 Mendu ĝin ĉe
 S-ro K. NIŜIMURA
 124, Rue de la Pompe, PARIS-XVI^e

Le Gérant : HENRI SELVES

Oomoto-Presejo Esperantista (V. Polgar), 33, rue Lacépède, Paris, V^e

